

## Retiriĝado : duonresonanco al nia malkreskado

Tio okazis iun mardon, tagmeze, kaj neniŭ antaŭvidis ĝin. Iel senreziste, ni akceptis tiun renverson. Kolektivana memlimigon kaj poste individuan, aŭ la malon. Tio ne estas la "deflankiĝo", kiun ni malkreskistoj esperis. Ĉu ne estas evidente, ke la decido pri retiriĝado, *tia, kian* ni ricevas ĝin, elmontras almonde de la epidemio la fiaskon de la publikaj politikoj, kiuj alvade tradukiĝas per aŭtoritata kaj tekno-sciencisma regado? Tio estas la du flankoj de unu sama biopolitiko porkreska, regisma, elitisma, nedeca kaj sensenta. Tamen en tiu retiriĝado troviĝas kvazaŭ *interompita paŝo de cikonio*. Kaj tio ne estas ignorinda! Post la retiriĝado, okazos denove recesio, resaltoj kaj rebatoj, sed *dum* la retiriĝa tempo, konjunkte, okazas ia malkresko, jes ja, sed kia?

Temas pri historia momento, ĉar subite jen la ekonomia imperativo pri akcelado kaj senmezurado estas interompita, enkrampigita. Interkrampo malfermita en Francio la 17-an de marto 2020. Interkrampo, kiuj fermiĝos eble en majo aŭ junio, sed daŭre malfermita nun, meze de tutmondiĝo kaj en la tuta mondo. Pli ol la duono de la monda loĝantaro estas kvaranteniĝita! Krampoj ĉie malfermitaj pri malpli da produktado, malpli da konsumado, kaj do malpli da minado, malpli da ruboj, malpli da poluado, malpli da movoj, malpli da bruoj, malpli da laboro kaj do malpli da enspezoj, sed ankaŭ tute ne plu feriadoj, tute ne plu muzeoj aŭ koncertoj, tute ne plu sportaj renkontiĝoj nek maĉoj: nur esencaĵoj, daŭre difinendaj...

Ĉu ni vivas en kamparo ĉu en urbo, vivkvalito daŭras, kun diversaj niveloj de eltenebleco (ĉu ĝardeno, balkono, aŭ fenestro?) kaj sufero, kiujn ni ne devas pretervidi: malkresko duon-suferiga, malkresko duon-elektita. En vivkondiĉoj eĉ pli malfacilaj por la plej malfortaj – precipe kiam temas pri familia perforto – sobreco plioftiĝas kaj niaj rilatoj sociaj, familiaj kaj amikaj estas niaj valoregaj kuraciloj. Ni aŭdas pri relokigo, pri proksimaj cirkuladoj, pri malrapidiĝo, pri rezignado. Ni partoprenas aŭ ĉeestas okazaĵojn solidarajn, kreivajn, ni admiras la vekigiĝon de printempo. Nu, simpla ĝojo pri ekzisto montriĝas, kaj tio danke al ... nia komuna socia organizo, frukto ekde 1945 de minimuma demokrata vivo, kiu tamen ankoraŭ certigas nemalhavablaĵon: ian socian pacon. Prezidanto Macro ja deklaris "Ni estas en milito". Sed ne temas pri milito, ĉar ne estas venkenda malamiko, nek homoj mortigendaj, krom tordante la sencojn de vortoj por biopolitikaj celoj. Tamen estas mortintoj: temas do, eble, pri duonmilito, sed neniŭ malamiko staras ĉe la horizonto. Duonmilito, kaj do duonpaco, ja vaste certigita de la laboristoj de la publikaj servoj kaj de homflegado, kiuj limigas la epidemion kuracante la malsanulojn. Publikaj servoj, kaj ankaŭ ĉiuj tiuj postenoj – tiu malsupra Francio, kiu hieraŭ manifestaciis sur la rondoplacoj – kiuj hodiaŭ estas metitaj sur la frontlinio: sen ĝenerala disfalo. Ne eĉ disfalo de la ŝtato, tamen konsternita pro sia aŭdaco preni la politikan decidon de ekonomia bremsado. Bedaŭrinde ĝi trankviliĝas puŝante tiom, kiom li kapablas sian polican aŭtoritato kaj siajn jurajn esceptajn eksperimentojn.

Duonmilito pro morto kiu vagadas, duonpaco ĉar vagado estas malpermesita. La morto - kiu estas la limo de ĉiuj vivoj - timigas. Aparte, en politika reĝimo por kreskado asertita senlima, kreskado, kiu povas esti vidita kiel nado de la morto. La morto povas timigi, kaj malprava timo estas ĉiam bone uzebla de regantoj, kiuj volas protekti sin: do, el tio, duonmilito.

Jen leciono por la malkreskado: se ĝi tuŝus ion ajn per malprava timo, ĝi disfalus. Malkresko estas enterkrampaĵo, sed en paco.

Retiriĝintoj, ni tamen havu pripensan tempon pri la jena konstato: "la neantaŭvideblaĵo okazis". Ni plene konsciiĝu pri tio: per la retiriĝado, la regantoj elektis ŝpari vivojn anstataŭ ekonomion. Ĉu interompita paŝo de malhonoro? Kia ajn estas la diverseco de niaj socialaj vivkondiĉoj, kaj ili

kompreneble ne estas tiom facilaj por ĉiuj, ni aŭdacu delikate gustumi tiujn momentojn: la malpremiĝon de la ekologia premsigno, la teksaranĝon de niaj sociaj ligiloj, la densecon de silentoj, la aeron, kiu mildiĝas, la koloron de niaj vivoj, la susuradon de la vivantaro. *Carpe diem!* Ni memoru tiun guston, tiun de la salo, de la signifo de nia komuna vivo. *Carpe diem relegationis!*

Nu, tiu retiriĝo estas duonmalkresko: ni aŭdacu aserti, ke nenio jam pli similis al malkresko ol tiu konsentita momento de retiriĝo, des pli, ke estas ankaŭ parto de porciumado por (preskaŭ) ĉiuj.

Irvojo de malamata socio al dezirata socio.

Nia ekologia premsigno malpliĝas entute kaj pace. "Per la fakto", tiu momento estas ekologie iom pli daŭrigebla por la homaro. La ekologia bilanco de tiu malkreska interkrampaĵo estos nekontestebla: "tio estis haltopaŭzo, ripoztempo." Sed post la retiriĝado, kion aŭguri?

Ekonomie, kompreneble okazos alia afero. Plej malbone, sociale, nia atento al aliuloj kaj nia zorgo pri aliuloj devigas nin sencece denunci la malhelan flankon de tiu retiriĝado. Necesas konstati, ke la epidemio trafos precipe la plej malriĉajn, la malriĝigitajn de la ekonomia sistemo. Krome, la maldeco de la plej riĉaj, kvankam retiriĝintaj, ne malaperis. Neniŭ mirkalo farita de la registaroj. Ne temas (ĉu baldaŭ?) pri eltiri la riĉaĵojn de la plej riĉaj (per esceptaj impostoj sur la havaĵoj kaj la enspezoj, kiel farite en postmilita epoko) por efektiviĝi dispartigon kaj bonvivon de ĉiuj en sociale deca socio. La malkresko de malegaleco ankoraŭ ne okazas nun.

Nun, temas pri ŝanĝo de horo... kaj jaro: 1984, jen vi! Big Brother ja estas tie, li rigardas nin, li sendas textmesaĝojn, gvatas nin, registras nin, parolas al ni el sia spavo, spuras nin per nia saĝtelefono, disigas nin, individuigas nin. La direkto de la tekniko ja estas politika... Telelaboro, telemedicino, teleinstruado, skype-aperitivado, ktp. La ekranoj mallarĝiĝas niajn senteblajn mondojn. Plifortigo de la sociaj retoj, kiuj povas ligi nur tiujn, kiuj jam estas disigitaj. Ankaŭ pri tio, jen politika detaĵo, neniŭ miraklo pri la partigo de potenco: la registaro daŭre decidas sole, sen ni, do kontraŭ ni. Ĉie la demokratio estas kvarenteniĝita. Jen porelefanta kuracilo: ĉiaj ordondekretoj! Tio ne estas demokrata feliĉo! Des pli, ke ni jam suferis pri krizostato, kiu enŝoviĝas en ordinaran leĝaron.

Jen, portempe, lecionoj de la retiriĝado.

A/ Tiu retiriĝado malfermis interkrampaĵon. Karaj malkreskistoj, bone memoru tion. Ni ne estas revantaj: nia revo pri malkreskado do eblas. Tiel la malkreskado estos aparta interkrampa periodo, memorganizita irvojo al ekologie daŭriglaj socioj, sociale decaj kaj demokrate organizitaj, tra malkresko de minado, de produktado, de konsumado, de cirkulado kaj de rubaĵoj.

B/ Kiam la interkrampo de la retiriĝado oficiale malfermiĝos, ni ja scias, ke ni ne mirakle alvenos en mondo senigita de la revo pri kreskado, ke la ekonomio facile retrudos siajn rakontojn, siajn ŝuldojn, siajn alĝustigojn, ke ĝi utiligos surfacan relokigon por la servo de biasa suvereneco... Sed ĉe la tempo de ilia venĝo, ni havos novan argumenton: jes, politiko povas preni la decidon bremsi la ekonomion. Ni travivis tion en nia propra karno.

La malkreskado estas racia ideo por taŭge paŭzigi la mondon.

Olivier Zimmermann (Svisio), Élodie Vieille-Blanchard, Jacques Testart, Mathilde Szuba, Christian Sunt, Agnès Sinaï, Michel Simonin, Luc Semal, Onofrio Romano (Italio), Olivier Rey, Christine Poilly, Irène Pereira, Jean-Luc Pasquinet, Baptiste Mylondo, Karine Mauvilly, Vincent Liegey, Michel Lepesant, Bernard Legros (Belgio), Francis Leboutte (Belgiq), Stéphane Lavignotte, Antony Laurent, François Jarrige, Mathilde Girault, Maële Giard, Loriane Ferreira, Guillaume Faburel, Robin Delobel (Belgio), Alice Canabate, Thierry Brulavoine, Thierry Brugvin, Geneviève Azam, Alain Adriaens (Belgio).